Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, Songĝobildoj IX

tradukita de Manfred Retzlaff

Dormante milde songĝis mi,
Ĉagren' forlasis min,
Al mi aperis songĝ-vizi',
Plej bela la knabin'.

Marmore pala estis ŝi
Kaj plena de sekret',
En la okulo naĝis ĝi
Samkiel perl-bluet'.

Kaj tiu bildo de marmor'
Mallaŭte movis sin,
Premetas sin al mia kor',
Karesis ame min.

Batadas laŭte mia kor',
Varmege brulas ĝi;
Al ŝi sentiĝas ne amor',
Ŝi estas el glaci'.

Ŝi diris: Kvankam estas mi
Malvarma kiel mort',
Konata tamen estas ĝi
Al mi, de l' amo fort'.

. . .

Ne ruĝas mia buŝ' kaj vang',
Sed min ne timu vi;
Tra mia kor' ne fluas sang',
Sed vin tre amas mi.

Kaj pli sovaĝe premis ŝi
Min preskaŭ ĝis dolor';
Forlasis min je l' kokvir-kri'
La ino de marmor'.

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Traumbilder IX" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-697-1404 (2012-12-05 22:35:03)